

Candor æternæ

Brevier-Himno

Kristnaska tempo > antaŭ Epifanio > horo de la legaĵoj

*Candor æternæ Deitatis alme,
Christe, tu lumen, venia atque vita
advenis, morbis hominum medela,
porta salutis.*

Bril' beno-plena de l' eterna Dio,
Krist' pardonema, lumo Vi kaj vivo,
por nin sanigi Vi al ni aperas,
pordo de l' savo.

*Intonat terræ chorus angelorum
cælicum carmen, nova sæcla dicens,
gloriam Patri, generique nostro
gaudia pacis.*

Nun al la tero kantas la anĝeloj
himnon ĉielan pri erao nova,
gloron al Di', al ni, la homa gento,
ĝojon kaj pacon.

*Qui iaces parvus dominans et orbi,
Virginis fructus sine labe sanctæ,
Christe, iam mundo potiaris omni,
semper amandus.*

Eta Vi kuŝas, Reĝ' de l' universo,
frukto de l' sankta, pura Virgulino,
Kristo, jam estru Vi la tutan mondon,
ĉiam aminda.

*Nascaris cælos patriam daturus,
unus e nobis, caro nostra factus;
innova mentes, trahe caritatis
pectora vinclis.*

Unu el ni, naskiĝas Vi en karno,
por ke ni havu hejmon en ĉielo;
Vi nin novigu, tiru nin per ŝnuroj,
ŝnuroj de amo.

*Cætus exsultans canit ecce noster,
angelis læto sociatus ore,
et Patri tecum parilique Amori
cantica laudis.*

Jen nia ĥoro kantas jubilate
en kunuleco gaja de l' anĝeloj,
Krist', kun la Patro kaj la Dia Amo,
kantojn de laŭdo.

Amen.

Amen.

latina T: nekonata verkinto

E: Albrecht Kronenberger 2008